

sub la suda kruco ★
decembro 2016

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 24 [4] numero 125 – decembro 2016

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Aŭstralio

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de februaro 2017

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.**

Copyright © 2016 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087.

SUR LA KOVRILO: Trevor kaj Suzanne Palmer-Holton ludas dum la Zamenhof-festo en Melburno en 2015. Kontaktu vian lokan klubon por eltrovi detalojn pri la ĉi-jaraj Zamenhof-festoj en via ŝtato.

- 
- 6.** Rozojn nepre ne plu pluku!
 - 8.** La posumo de Di
 - 9.** Pri pli bona elparolado en Esperanto
 - 13.** Recenzo de *Esperanto: Learning and using the international language* de David Richardson
 - 14.** Ekskurso en 'andong'
 - 16.** Nekonata vizita destino: Palmerston North
 - 17.** Diplomatio estas senpova: problemoj ĉe la Ligo de Nacioj samas ĉe UN nun
 - 23.** Indrani en Okcidenta Aŭstralio
 - 24.** Konversacio kun Alekso, afabla hundo
 - 25.** Melburna biciklado
 - 27.** Kompatinda Malkolmo
 - 29.** Konjekto
 - 30.** Ganeŝo (Hindua fabelo)

Nekredeble jam alproksimiĝas la fino de ĉi tiu jaro: la tempo flugas, ĉu ne? Ekde mia redaktora vidpunkto, 2016 estis sukcesa jaro pro la eldono de altkvalitaj numeroj de ESK kun artikoloj de niaj kontribuintoj pri tre diversaj temoj. Mi ankaŭ volas danki al Don Rogers, Vera Payne, kaj Nicole Else pro ilia kontrolado de la enhavo.

Pri aliaj aferoj, verŝajne la plej diskutata temo en Nov-Zelando dum ĉi tiu jaro estis la plialtiĝo de domprezoj. Tamen, ne nur en Nov-Zelando: tiu estas grava temo ĉe la du flankoj de la maro Tasman. Kiam mi vizitis Melburnon en julio mi vidis en televidaj novaĵprogramoj kaj en tagĵurnaloj ke ankaŭ en Aŭstralio, la 'bonŝanca lando', oni plendas ke ne plu eblas aĉeti domon.

Jen la problemo: salajroj kreskas, sed domprezoj kreskas pli rapide. En Aŭklando (kie la problemo en Nov-Zelando estas plej grava), meza domo nun kostas NZ\$1 milionon (AU\$950 000), sed meza salajro estas proksimume NZ\$80 000. Kiel eblas aĉeti domon je tiu prezo kaj pagi grandegan hipotecon? Spertuloj diras ke hipoteko ne devas esti pli ol 3 foje pli granda ol onia salajro. En Aŭklando, meza domprezo/hipoteko estas 12 foje pli granda ol meza salajro (kaj 5-6 foje en Velingtono kaj aliaj urboj).

Oni kulpigas investantojn, ESK | paĝo 4 | 125 | decembro 2016

enmigrintojn, novajn regulojn kaj normojn por konstruado, bankojn kiuj volonte pruntedonas monon je tre maltaltaj interezoj, aŭ nin mem kiuj nun volas loĝi en pli grandaj, altkvalitaj domoj (la grandeco de la meza domo en Nov-Zelando estis antaŭe 100 m² sed nun 200 m² – la tria meza grandeco en la mondo post Usono kaj Kanado). Niaj ĵurnalistoj kiuj emas troigi multajn aferojn parolas pri 'milito inter generacioj'. Unuflanke, mezaĝuloj kaj maljunuloj, jam paginte hipotecon, nun loĝas en altvaloraj, grandaj domoj. Ili sentas sin riĉaj. Ili facile akiras monon el banko kontraŭ la alta valoro de la familia domo, por aĉeti duan, trian, kvaran ... domon, aŭ aŭtomobilon, aŭ eksterlandan vojaĝon en luksa krosŝipo. Aŭ ili povas vendi sian domon kaj emeritiĝi en pli malgranda domo en kampara urbeto kun multa restanta mono en bankkonto.

Aliflanke, junuloj antaŭvidas nenian eblecon por ŝpari monon por aĉeti domon. Se ili bonŝancas, ili povos aĉeti malgrandan, unuĉambran apartamenton aŭ dometon en fora parto de la urbo. Ili diras ke ili neniam povos havi familion ĉar, kun infanoj, ne eblos ŝpari monon por aĉeti familian domon aŭ pagi hipotecon kun nur unu anstataŭ du salajroj. Mezaĝuloj kaj maljunuloj respondas ke junuloj ne rajtas plendi: ili ne havas monon por

aĉeti domon ĉar ili volas havi ĉion: novan saĝtelefonon, ĉiutagan viziton al kafejo, kaj senĉesan biertrinkadon kaj festumadon.

Pro altaj domprezoj, oni legas pli kaj pli ofte anekdotojn pri familioj kiuj forlasas Aŭklandon por iri loĝi en apudaj urbetoj. Tie se ili povos akiri laboron (ne malfacile por instruistoj, flegistoj, plumbistoj ktp), ili ĝuas pli trankvilan vivstilon en multoble pli malmultekosta domo. Tiu estas unu el la favoraj rezultoj de la domprezaltiĝo: la loĝantaro

de etaj urboj kaj kamparaj vilaĝoj kreskas. Aliflanke, enloĝantoj de tiuj etaj urboj kaj vilaĝoj nun plendas ĉar ankaŭ tie domprezoj nun komencas plialtiĝi pro la alveno de 'rifuĝintoj' el la grandaj urboj.

Do, kio okazos? La kresko de domprezoj ne ĉesas. La problemo daŭras kaj plendoj pli kaj pli laŭtiĝas. Kiuj jam posedas domon estas feliĉaj dum kiuj volas posedi domon, tiuj malfeliĉas. Ĉi tiu temo estas grava ĉar ni ĉiuj loĝas en domo. Kion vi opinias?

Novaj, modernaspektaj domoj en Velingtono



Rozojn nepre ne plu pluku!

BOB FELBY (ADELAJDO)

En ies ĝardeno, ni diru en iu ajn vilaĝo, ĉu vilaĝo “Fjelby” en la dana Sudjuto apud la germana landlimo aŭ ĉu en la germana vilaĝo “Hahndorf” en Sudaŭstralio, loĝas multaj malriĉuloj kaj unu aŭ du riĉeguloj. Inter la domoj estas iu eĉ tre malnova dometo. En ĝi loĝas du gemaljunuloj. Ili konas unu la alian jam dum multaj jaroj, fakte 60 jaroj. Bonvolu ne miskompreni min, ili loĝas kune en tiu malnova dometo, sed ili estas geedzoj, ĉar ili geedziĝis antaŭ proksimume 40 jaroj.

En alia domo en la sama vilaĝo loĝas alia geedza paro. Ili estas verŝajne nur ĉirkaŭ 30 aŭ 40 jaraĝaj. Do, ankoraŭ ne gemaljunuloj. Sed ni atendu kelkajn jarojn kaj ankaŭ ili komencos iĝi saĝaj, almenaŭ iomete pli saĝaj kaj komprenemaj. Ilia domo ne estas malnova, ĝi estas preskaŭ tute nova kaj granda kaj bela. Sed ankaŭ la domo de la gemaljunuloj estas bela, sed kompreneble malgranda. Kiu bezonas grandegan domegon? Eĉ gereĝoj povas facile vivi sen io tia, sed la popolo ja amas siajn gereĝojn kaj volonte donas al ili ĉion kion tiuj volas havi! Tro multaj homoj dormas ĉiunokte en parkoj kaj sur marbordoj pro manko de taŭgaj hejmoj!

La geedzoj en la nova domo ne estas gemaljunuloj, sed tion mi ja jam menciis. Sed iun belan tagon ili plej verŝajne estos. Sed ili estas iuj el la geriĉeguloj de la vilaĝo. La geedzoj en la malnova domo havas

bonan konsciencon, sed ili ne estas riĉegaj, sed sanaj. Eĉ mense sanaj! Ili estas malriĉaj. Ho pardonu, tion mi ja jam unu fojon menciis. Ili estas eĉ pli malriĉaj ol mi kaj mia hundo. Precipe mia hundo ne havas multan monon, sed li havas min kaj mi havas lin kaj, kio estas eĉ pli grava, ni havas unu la alian!!!

Ambaŭ geedzaj paroj posedas, krom sian belegan domon, ankaŭ belegan ĝardenon. La ĝardeno de la geriĉeguloj estas belega kaj moderna. Ili havas ja monon kaj povas pagi profesion ĝardeniston. Tiu de la gemalriĉeguloj ne estas moderna; male ĝi estas malmoderna, ĉarma kaj plaĉaspekta, kiel ĝardenoj iam kutimis aspekti!

En ambaŭ ĝardenoj kreskas, kompreneble, multaj diversaj plantoj, tiel nomataj kreskaĵoj. Kelkaj nomatas arboj, ĉar ili estas arboj, aliaj ne estas arboj, ili havas do aliajn nomojn. Birdoj amas ambaŭ ĝardenojn kaj flugas en kaj el ili. Kompreneble multaj restas en ili kaj konsideras tiujn ĝardenojn siaj hejmoj. Tial naskiĝas ĉiun printempon multaj novaj generacioj de belegaj kaj ĉarmegaj idoj kiuj ĉiuj iĝos belegaj kantantoj!

Sed tio kio plej interesas min estas iliaj belgaj rozoj. Pardonu min, ĉu mi skribis “belgaj”? Ili kompreneble ne kreskigas belgajn rozojn, tio estis tajperaro, mia intenco estis skribi “belegajn rozojn! Laŭ la natura naturo de rozoj ili aperas en multaj

diversaj kaj malsamaj koloroj kaj eble rasoj, se ekzistas ankaŭ rozaj rasoj. Nur sciencistoj scias tiajn aferojn! Mi konfesas ke mi ne estas sciencisto kaj tial ne scias multon. Sed mi scias ke sciencistoj amas enklasigi nin homojn en rasojn, kvazaŭ tio gravus! Sed, kvankam la rozoj en la ĝardeno de la geriĉeguloj estas ege ĉarmaj, belaspektaj kaj bonodoraj, tiuj en la ĝardeno de la gemalriĉuloj estas eĉ multe pli ĉarmaj, belaspektaj, kaj bonodoraj. Sed tio estas, kompreneble, nur mia opinio. La opinio de la geriĉeguloj estas kompreneble mala al mia.

Sed en la vilaĝo troviĝas ja ankaŭ tiuj kiuj ne kreskigas rozojn, fakte multaj kreskigas nur trudherbojn en siaj ĝardenoj. Do, kiam naskiĝas beboj, tiel nomataj suĉinfanoj, aŭ ekzemple okazas naskiĝtagdatrevenoj, tio okazas al ĉiu vilaĝo ĉiun jaron, kaj ĉiun 10-an jaron iu iĝas 50-jara, 60-jara, 70-jara, 80-jara kaj eĉ 90 kaj 100-jara. Multaj ne iĝas pli ol 100-jaraj. Sed ili ĉiuj komencas sian vivon je la unua tago. Do ion ni ĉiuj havas komune, ĉu ne? Sed ne nur datrevenoj de naskiĝtagoj okazas. Okazas ankaŭ tio kio atendas nin ĉiujn. Niaj vivoj finiĝos, ĉu ne? La longa vagonaro haltas, kaj iu(j) el ni devas elvagonariĝi. Tiam okazas granda funebra solenaĵo nomata entombigo kaj la plej multaj vilaĝanoj ornamas la vilaĝan preĝejon per floroj, ofte rozoj. Tiujn rozojn ili, ĉar ili en siaj propraj ĝardenoj kreskigas nur trudherbojn, aĉetas de la du geriĉeguloj en la vilaĝo. Tiuj du geriĉeguloj do iĝas iom pli riĉaj, ĉu ne? Sed tio restu ilia

problemo! Certe ne nia - ni havas sufiĉe da aliaj problemoj ĉefe pro la geriĉeguloj!

Sed kompreneble ili iĝas riĉaj ne nur pro la forpaso de aliaj vilaĝanoj. Kiel mi jam menciis, oni bezonas rozojn ankaŭ por celebri kaj festi naskiĝojn de novaj suĉinfanoj, kaj kompreneble ankaŭ por festi la datrevenojn de la diversaj naskiĝtagoj okazantaj de tempo al tempo en la vilaĝo.

Iuj gevilaĝanoj preferas aĉeti siajn rozojn de la malriĉaj gemaljunuloj. Ankaŭ tio estas komprenebla, ĉu ne? Sed jen, nun sekvas la surprizo. Tiuj du gemaljunuloj tute ne volas vendi siajn rozojn. Jen sekvas tio kion mi lernis de ili, kiam mi pasintan fojon vizitis ilin: "Ni ne vendas, vendis nek vendos niajn rozojn! Kion tiuj geriĉeguloj ne scias, aŭ ne volas scii, estas ke ankaŭ rozoj estas vivaj estuloj en la naturo. Ili naskiĝis ne por riĉigi iun ajn, sed nur por ĝojigi nin ĉiujn." Ofte, fakte tro ofte, kiam la vento en la vespero blovas de la ĝardeno de la geriĉeguloj ĉi tien, ni aŭdas la voĉojn de la rozoj en ilia ĝardeno. Jen tio, kion ni aŭdas":

"Mi preskaŭ ne plu povas elteni tion. Tre longe mi ĝojis pro miaj multaj etaj infanoj kiuj plibeligis ne nur min, sed la tutan ĝardenon de la geriĉeguloj. La geriĉeguloj forplukis unu post la alia niajn infanojn, kiuj do devis forpasi kelkajn tagojn poste. Ĉu tio estas justa? Mi tute ne komprenas per kies permeso oni venas kaj forprenas niajn infanojn. Ĉu oni neniam lernos? Se mi nur estus naskinta en la ĝardeno de la gemalriĉeguloj tio ne okazus. Gemalriĉeguloj estas kompatemaj kaj

ĝojas pro la beleco de siaj ĝardenoj. Mi estus multe pli feliĉa se mi estus naskinta en ilia ĝardeno!"

Nu, tion mi aŭdis kaj ankoraŭ aŭdas de tempo al tempo. Kaj nun ankaŭ vi scias tion kion la rozarbustoj pensas kaj priploras. Ni ĉiuj naskiĝas sur tiu ĉi planedo ne por vivi en teruro kaj esti mortigitaj de tiuj kiuj estas iomete pli grandaj kaj potencaj ol ni. Ni ĉiuj havas la saman rajton je la vivo.

Sed ni ne forgesu kompati tiujn homojn kiuj perdis karajn familianojn aŭ geamikojn. Tiuj kiuj forpasis kaŭzis ke multaj larmoj fluis el la okuloj de tiuj kiuj sukcesis postvivi ilin, sed ni pensu ankaŭ kun kompato pri la rozarbustoj, kies infanoj tiom kruele estis forŝtelitaj, metitaj sur ĉerkojn de forpasintaj homoj, kaj kiuj, tre baldaŭ poste, ankaŭ forpasis! Malĝojige, ĉu ne?

La posumo de Di

DI GRANT (MASTERTON)

Estis la kvara horo frumatene. Bruoj panikaj venis el sidĉambro. Ĉu super la plafono? Ne. Ĉu mia kato, Sinjoro Botoj? Ne, li estis ekstere. Dormeme, mi eniris la sidĉambron. Singardeme, mi ĉirkaŭrigardis la ĉambron. La fajroŝirmilo kuŝis sur la planko. Pli kaj pli strange. Ho tie! Giganta blato alkroĉiĝis al la kadro inter fenestroj. Blato? Grandega, fremda, nigra. Tro granda, tre granda, tre kvieta. Ha! Posumo! Iom mireginte, mi malfermis fenestron por ke ĝi iru eksteren dum mi eliras por alporti balailon. Reveninte en la ĉambron, nur restis fulgaj spuroj sur la kadro kaj fekaĵo sur la fenestra breto. Ĉio kvieta. Dramo finita!

Poste, mi faris foton por memoraĵo. Mi forigis la fekaĵon kaj fulgajn spurojn kaj mi purigis la ĉambron. Pli malfrue en la mateno mi parolis kun miaj najbaroj, Irene kaj Gary, pri la afero. Mi dubis ĉu la virinoj de la Esperanto-grupo povos kunveni ĉi tie hodiaŭ. Ĉu la ĉambro malbonodoras? Mi abunde surŝutis natrian bikarbonaton kune kun viola

esenco sur la fenestra breto. Tiam, mi ekstereniris por tondi la gazonon tre rapide kaj por sarki la ĝardenon. Steph kaj Lydia alvenis frue – ne, ne tro frue, mi malfruis. Mi sentis min iom histeria. La aliaj klubanoj alvenis kaj nia kunveno komenciĝis. Dum ni finis skrib-ekzercon de la antaŭa kunveno, Irene telefonis: ŝia amiko, Michael, alvenos por meti dratretajan kovrilon sur la kamentubo. Ni amuzis nin per kelkaj ludoj de bingo.

Michael alvenis kaj grimpis sur la tegmenton. Gary tenis la malsupron de la ŝtupetaro dum Michael grimpis. Gary ĵetis ŝnuron supren al Michael por ke li ligu ĝin al la kamentubo. "Ĉu vi pensas ke oni donos tason da teo al ni?" laŭtdiris Gary al Michael. Joy diris ke la registara instanco nun postulas ke oni nepre devas uzi skafaldon. La registaro ne pagos kompenson se oni falas se oni uzas ŝtupareton. La kunveno finiĝis post kafo kaj biskvitoj.

Trankvila vespero. Mi jam enlitiĝis je la 10-a ptm kiam strangaj bruoj aŭdiĝis denove en la sidĉambro. Krak!

Frap! Frap!

Ho ne, ne denove! Mi rampis el la lito. Irene telefonis: ili ankaŭ aŭdis la bruojn tra nia kuna muro. Ili alvenis al mia domo kaj Irene alportis sian balailon. Gary volis alporti lancon, sed Irene diris “Nenia sango kaj intesto!”. Mi ankaŭ ne volis sangon aŭ intestojn. La lampo de la plafono ne funkciis. Mi enŝaltis lampeton de mia poŝtelefono. Ni rigardis sube kaj malantaŭ la meblaro. Ni trovis nenion.

Gary eĉ rigardis en la tirkesto de miaj artaĵoj. Nenio tie. Ho, pli da posuma fekaĵo sur la fenestra breto. “Ha, alia posumo ĉi tie malantaŭ la orgeno,” murmuris Gary. “Kie?” akre kriis Irene kaj mi dum ni saltis sur la sofona. Ĉiu el ni prenis kusenon al la brusto kiel ŝirmilon. “Ho, tre ĉarma,” diris Irene. Grandaj okuloj, grandaj oreloj, longa, nigra vosto, lanuge griza kapo. Ĝi premis sin en angulon de la ĉambro. Senpense, Gary puŝis ĝin

malantaŭen per balailo. Mi scias, posumo ne ŝatas brilan lumon, mi uzos ekbrilon de mia fotilo. Rapide mi trovis ĝin. Ekbrilo – neniu posumo. Ekbrilo – malplena seĝo. Ekbrilo – malplena planko. Atendu momenton! Tie ĝi estis, ludante strute kun la kapo sub lankovrilo. La ungoj de ĝiaj malantaŭaj piedoj tenegis en tapiŝon. La kapo firme sub la kovrilo, kaj ĝia postaĵo ekstere kun la vosto kuŝante malantaŭe. “Mi volas spaton,” diris Gary. “Ne!” kriegis Irene kaj mi el la sofo. “Prenu la platan sakegon de la dua ĉambro,” mi diris. Singarde, Gary puŝis la posumon per balailo en la sakegon, faldis la supron, kaj portis ĉion eksteren.

Ni, virinoj de la Esperanto-grupo, estis tre surprizitaj kiam ni aŭdis ke ni kunvenis kun silenta posumo. Ĉu ĝi nun komprenas Esperanton?

Pri pli bona elparolado en Esperanto de la literoj “ng”, “nk” “r”, kaj “eŭ”

BOB FELBY (ADELAJDO)

Mi amas Esperanton kaj esperas ke ankaŭ vi tion faras. Sed mi antaŭ longe rimarkis ke multaj esperantistoj havas problemojn pri la ĝusta elparolado de “ng”, “nk” “r”, kaj “eŭ”. Precipe danoj, angloj, kaj germanoj misprononcas ilin. Do, kion ni devos fari por ne ripeti tiujn ridindajn erarojn? Ni devas ekzerci la elparoladon, ĉu ne?

Alia problemo por angleparolantoj estas la vokaloj “a”, “e”, “i”, “o” kaj “u”. Mi sincere petegas vin ne plu elparoli tiujn vokalojn kvazaŭ

vi parolus angle. “A” estas ĉiam elparolata kiel “a” en “after”. Neniam kiel “a” en “acacia”. “E” estas ĉiam elparolata kiel “e” en “Emmy”, neniam kiel “e” en “enough”. “I” estas ĉiam elparolata kiel “i” en “imminent”, neniam kiel “i” en “idea”. “O” estas ĉiam elparolata kiel “o” en “ocarina”, neniam kiel “o” en “oak”. “U” estas ĉiam elparolata kiel “duobla o” kiel en “foot”. Sed decas aldoni ke tute ne eblas kompreni tion kion mi ĵus skribis, ĉar ankaŭ en la

angla estas multegaj dialektoj, kaj mi ja ne kompetentas pri iu ajn el ili. Sed en Esperanto oni neniam elparolas la vokalojn kiel en la germana kaj sveda “ö”, aŭ la dana “ø”. Bonvolu memori ke la Esperanta “sur” estas elparolata “soor”, kaj neniam kiel la angla “sir”!

La ora regulo estas ke ĉiu vorto estu elparolata kiel ĝi estas skribita. La emfazo estu ĉiam sur la antaŭlasta silabo. La urbo “Honkongo” estas problemo por la plej multaj el ni, ĉu ne? La vorto “Honkongo” konsistas i.a. ankaŭ el la du vortparoj “nk” kaj “ng”. Ni ne estas permesataj miselparoli tiujn du vortparojn. Zamenhof klare diris ke ĉiu litero estu elparolata. Do neniam plu diru “Honk”, sed nur “hon”. Tiam ne diru “kong”, sed simple “kon”. Post kiam vi estos elparolinta “kon”, vi simple bezonas elparoli nur “go”. Tre facile, ĉu ne? Kiel ĉiam, oni devas pensi antaŭ ol oni parolas!

La “r” estas alia granda problemo por la plej multaj el ni en Aŭstralio. Ofte ĝi tute ne aŭdeblas. Sed ne nur angleparolantoj ŝajne rifuzas elparoli ĝin. Tion same rifuzas multaj danoj kaj germanoj. Svedoj kaj norvegoj eĉ tre bone elparolas ĝin, sed ne en ĉiuj vortoj, eĉ se tiuj enhavas la literon “r”. La plej multaj el ni scias ke ni ne estas perfektaj, sed nur malmultaj el ni provas perfektigi, aŭ almenaŭ pliboniĝi. Plaĉus al mi vidi plialtiĝon de la lingvonivelo de Esperanto en Aŭstralio!

Kiel mondcivitano parolanta la Zamenhofan majstroverkon, mi kompreneble havas geamikojn preskaŭ ĉie en la mondo. Iam mi menciis al unu el ili, tre bonega

amiko germana, ke danoj malĝuste elparolas la “r”. Li responde skribis al mi ke iam, en Germanujo, li parolis kun alia germana esperantisto. La alia germana amiko rakontis ke al sia Esperanto-grupo venis magiisto por distri la gesamideanojn. Li sorĉis antaŭ ili per kartoj. Kompreneble ĉiuj bone amuziĝis. Kiel ĉiam unu el la ĉeestantoj devis elekti iun karton el inter multaj. La germana amiko, tre bona amiko, finis sian raporton dirante: “kaj je la fino de la vespero la magiisto eldiris: “kaj nun mi disŝiros la “katon”. Kiu kato, kaj tre kompatinda kato, ĉu ne? Kion faris la kato por meriti tian kruelan sorton? Sed tio pruvas ke oni devas almenaŭ provi elparoli Esperanton pli ĝuste.

Kaj alia terura problemo, sed ne por danoj, svedoj, norvegoj ktp. kaj germanoj, estas la elparolado de la literoj “eŭ”. La germanoj elparolas “eŭ” kiel “oj”, sed eĉ tre facile povas elparoli ilin ankaŭ en Esperanto, la danoj elparolas “eŭ” kiel “ev”, do iom pli bone, sed la angleparolantoj, la plej amuzaj el ni ĉiuj, elparolas tiujn du Esperanto-literojn “ju”. Se mi estus unu el tiuj kiuj kredas ke la mortintoj restos en siaj korpoj post la morto, mi dirus ke Zamenhof, aŭdante tion, turnus sin en sia tombo. Sed mi ne diras tion. Zamenhof ne estas en iu ajn tombo, li estas en la ĉielo ĉar tie li meritas esti, ĉu ne?

Sed kiel venis en la kapon de angleparolantoj ke “e” estu elparolata kiel “j” kaj “ŭ” kiel “u”? Laŭ la bonega Esperanto-alfabeto estas granda diferenco inter “ŭ” kaj “u”.

Sed bonvolu memori ke “karto” neniam estu elparolata “kato”. “Katoj” estas eĉ tre karesmaj bestoj

kaj “kartoj” estas io kion oni sendas unu al la alia je Kristnasko. Parolante pri katoj, ĉu vi scias la nomon de la dana ĉefurbo? En Esperanto ĝi estas ĝuste “Kopenhago”. Tiu vorto ne sonas ĝuste al danaj oreloj, kie ĝi estas “København”, sed espereble la plej multaj oreloj de la cetera mondo preferas “kopenhago”.

Iu distrikto de Kopenhago estas “Okcidenta Kopenhago”. Tre interesa loko kun bierfarejo, impostpagejo, Savarmeja ejo kaj preĝejo nomata “Kristkirken”, preĝejo de Kristo. Mi baptiĝis tie la 28-an de aŭgusto 1932, en la mateno. Mia frato Børge poste, fakte en 1934, baptiĝis en “Jesuskirken” – preĝejo de Jesuo – en bonega antaŭurbo “Valby” ĉar ni, nia fratino Gerda, kaj ambaŭ niaj gepatroj intertempe transloĝiĝis al Valby. Neniu el ni poste vizitis tiujn du preĝejojn, do ni antaŭlonge forgesis kiel ili aspektas interne. Eble ni eĉ ne rigardis ĝian internon, ĉar tiam ni estis ja nur malgrandaj suĉinfanoj!

Pro la fakto ke al poŝtistoj kaj noktogardistoj ne estas permesate rakonti tion kio okazas al ili dum ilia deĵorado, ni do ne plu parolu pri mi, sed pri iu alia poŝtisto kaj iu alia noktogardisto.

Proksime al la bierfarejo estas malgranda laborejo, malgranda sed, malgraŭ tio, iomete pli granda ol nia skatolfabriko en Adelajdo. Mi tute ne memoras kion oni faras en tiu fabriko, depost tiam mi iĝis ĉiam pli kaj pli forgesema. Sed estis iomete tre amuze. La poŝtisto, tre juna esperantisto, liveris poŝtaĵojn (atentu, tre gravas la supersigno, ĉu ne? Alie povus okazi amuza sed grava miskompreno!) al tiu malgranda

fabriko. Li eniris la oficejon dirante: “Jen poŝtaĵoj por vi!” Li elsakigis la poŝtaĵojn, kaj la plej multaj el ili estis Esperanto-leteroj kaj novaĵleteroj, gazetoj kiaj “Heroldo de Esperanto”, “Kopenhaga Esperanto-Klubo” ktp. “Ho”, li diris, “ĉu laboras esperantistoj ĉi tie?” “Jes, mi konfesas,” diris la estro kaj posedanto de la fabriketo, “mi estas esperantisto”. “Ĉu vere?” diris la poŝtisto, “ankaŭ mi estas esperantisto.” “Do,” diris la estro, “vi havu ĉiujn ĉi tiujn Esperanto-gazetojn kaj novaĵleterojn ktp. Prenu ilin hejmen kaj tralegu ilin. Kiam vi finos la tralegadon, bonvolu redoni ilin al mi. Estontece, kiam venos pli da Esperantaĵoj, vi prenu ilin kaj havu la honoron legi ilin la unua. Mi povas atendi. Kaj tiel estis. La juna esperantisto kaj la iom pli aĝa ambaŭ estis tre kontentaj.

Ĉiutage estis leteroj al la bierfarejo. Tiu estas la plej granda el ĉiuj fabrikoj en Okcidenta Kopenhago. Multaj el tiuj leteroj estis tiel nomataj “rekomenditaj” kaj postulis subskribon de iu sidanta en oficejo. La poŝtisto ricevis paperslipon kontraŭ la leteroj. Tiu slipo rajtigis lin al unu senpaga botelo da biero, trinkota en iu granda ĉambro kun tabloj kaj seĝoj. La juna poŝtisto baldaŭ lernis neniam doni al la sidanto ĉiujn leterojn samtempe. Li donis al li nur unu leteron, iris trinki sian bieron, reiris al la oficejo kaj donis al la sidanto alian leteron, ktp. ĝis ĉiuj leteroj estis liveritaj kaj la poŝtisto estis en eĉ tre bona, eĉ bonega, humoro!

Bonvolu memori ke povas okazi seriozaj miskomprenoj, se oni misprononcas “karton” kiel “katon”. Kiel jam unu fojon dirite, “kato” estas

eta dolĉa kaj ŝatata dorlotbesto dum “karto” estas eta kartonaĵo. “Kato” kaj “karto” estas do du malsimilaj aĵoj, tute ne la sama objekto, kaj ĉiu el ili meritas esti ĝuste elparolata.

Okazis iam ke la noktogardisto en la sama distrikto, do Okcidenta Kopenhago, devis eniri la alian fabrikon, ankaŭ kies nomon mi bedaŭrinde tute forgesis. Estis mallume kaj iomete malvarme. Antaŭ la pordo, ne pordego, sed tamen enirejo, staris maljunulino nigre vestita kun kelkaj butikumsaketoj plenaj de io manĝebla. Diris ŝi: “jen vi fine venas, mi atendis vin tre longe, eĉ longege en tiu ĉi malvarmo”. La noktogardisto ridetis amike al ŝi kaj, ĉar la maljunulino parolis treege rapide al li en la belega germana lingvo, li iom hezitis, sed baldaŭ respondis en sia propra malrapida varianto de la germana: “Kial vi atendas min en la mezo de la nokto?” Kaj ŝi respondis: “Mi venas ĉiun nokton por manĝigi la malsatajn katojn kiuj loĝas ĉi tie en la fabriko. Ĉiuj aliaj noktogardistoj scias tion.” “Kaj vi estas germanino, ĉu ne?” demandis la noktogardisto. “Ne, tute ne, mi ne estas germanino, mi estas estonino, sed mi ankoraŭ ne lernis la danan lingvon.” “Kaj vi elspezas multan monon manĝigante la katojn, ĉu ne?” daŭrigis la noktogardisto. “Jes, certe, iu devas ja fari tion, ĉu ne?” Jes, mi ne povas kontraŭdiri vin, iu ja devas fari ĉion por la bono de la kompatindaj katoj en Okcidenta Kopenhago.”

La noktogardisto malŝlosis la pordon kiu fakte estis enirejo, kaj ili kune eniris la korton malantaŭ la fabriko. Tie estis multegaj malplenaj lignokestoj. Pardonu min, tio estis

eraro, la lignokestoj ne estis malplenaj, ĉar en ĉiuj el ili estis multegaj katoj. Virkatoj, katinoj, kaj katidoj en ĉiuj koloroj kaj grandecoj kaj malgrandecoj. Miloj da grandaj flavaj okuloj rigardis la estoninon kaj la noktogardiston. La noktogardisto eniris la fabrikon kaj finis sian deĵoradon tie, sed unue li komencis ĝin, dum la estonino finis siajn devojn ekstere en la korto.

Tiam la noktogardisto malŝlosis la pordon kiu ne plu estis enirejo, sed intertempe iĝis elirejo, plej verŝajne danke al la magia magio de la magiisto germana. Germana magio funkcias eĉ en Okcidenta Kopenhago kiam noktogardisto renkontas estoninon! La noktogardisto ellasis la estoninon kaj sin. Ili adiaŭis unu la alian, la estonino iris hejmen al sia varma lito dum la noktogardisto daŭrigis sian deĵoradon en la multaj aliaj similaj lokoj.

Nu, tio kion ni povas lerni el tiu ĉi vera historio estas ke ne estas bone iam ajn disŝiri katojn. Se vi sentas ke vi devas ion ajn disŝiri, bonvolu disŝiru karton, eĉ katojn, sed neniam katon aŭ katojn. Tio estus kruela, kaj bonaj esperantistoj neniam kruelas!

Tiu virino estis ja vera anĝelino, ĉu ne? Tio ĉi okazis antaŭ pli ol 60 jaroj. Supozeble la estonino nun estas ĝuanta sian pli bonan vivon en la ĉielo, kaj espereble kelkaj el la dankemaj katoj estas tie kune kun ŝi. Ŝi certe kaj sendube meritas tion. Ŝi elspezis la plej grandan parton de sia pensio por la katoj kaj neniam pensis, kaj certe neniam diris, kaj neniam faris disŝiradon al iu ajn kato!

Recenzo de *Esperanto: Learning and using the international language* de David Richardson

JONATHAN COOPER (SIDNEJO)

Mi eksciis pri ĉi tiu libro antaŭ pluraj jaroj (kaj eĉ tiam ĝi ne estis nova), sed mi unuafoje rigardis kopion nur antaŭ monato. Ĉi tiun recenzon mi verkis por kiuj scivolos ĉu ĝi rekomendindas kaj por kiuj jam konas ĝin sed eble interesiga pri opinio de aliulo.

Lingvaj lernlibroj pli malpli falas en du kampojn: gramatikocentra (ekzemple, *Step by Step in Esperanto* de Montagu Butler) kaj rektametoda (ekzemple la libroj de Stano Marček). Ĉi tiu libro certe falas pli en la unuan kampon, sed la gramatikon ĝi prezentas milde kaj ne tro teorie. Anstataŭe, ĝi enkondukas konceptojn per utilaj ekzemploj. Ekzemple, estas sekcioneto: “formula phrases” (formulaj vortgrupoj): “openers, adding on, keeping on, questioning, disbelief, agreement, disagreement, changing the subject” (malfermiloj, aldoni, daŭri, demandi, nekredo, konsento, malkonsento, ŝanĝi la temon). Ankaŭ utilaj estas pluraj ekzercaj tabeloj kiujn la leganto povas uzi por krei frazojn el donitaj elementoj.

La tekstoj en la lasta parto de la libro estas bonegaj. Kelkaj originalaj poemoj de Zamenhof inkluziviĝas, kaj ankaŭ eltiraĵoj el liaj leteroj pri la kreado de la lingvo, kaj biografieto. Inter la aliaj estas poemo de William Auld (*Ebrio*) kaj eltiraĵoj el *Sur Sanga Tero* de Julio Baghy. Tiu parto enhavas ankaŭ anglalingvajn



ŝlosilojn por la lecionoj, dialogoj kaj ekzercoj, kvarpaĝan bibliografion, kaj Esperanto-anglan vortareton.

Trajto, verŝajne unika inter Esperanto-lernlibroj, estas sekcio ĉe la komenco: “Communication and the Language Barrier” (Komunikado kaj la lingva baro). Inkluzivita en kvar ĉapitroj estas historieto de helplingvoj kaj priskribo de la stato de Esperanto en la mondo (en 1988): “Esperanto Today — and

Tomorrow” (Esperanto hodiaŭ – kaj morgaŭ). Krom la fakto ke la libro estas nun tre malaktuala, estus pli bone – laŭ mi – ke la fona materialo estu multe pli mallonga aŭ metita en apendicon.

Kvankam la kopio kiun mi legis estas priskribita kiel la “third edition”, escepte de la kromkovrilo (kio pase mencias la interreton sur la klapo) ĝi fakte estas nur dua repesaĵo. Estus tre bone se oni reverkus la libron por la 21-a jarcento. **“Esperanto: Learning and using the international language”**

Verkisto: David Richardson

Unua eldono: 1988 (Represita: 1990, 2004)

Eldonejo: Esperanto League for North America

Formato: 368 paĝoj, 22 cm

ISBN: 0939785064

Havebla ĉe la libroservoj de Esperanto USA (www.esperanto-usa.org/retbutiko) kaj UEA (katalogo.uea.org)

Ekskurso en ‘andong’

KAM LEE (HOBARTO)

Unu el miaj plej ĉarmaj spertoj dum mia vizito al Indonezio en 2016 estis ekskurso en ‘andong’ tirata per ĉevalo laŭ kampaj stratoj ekster Jogĝakarta. ‘Andong’ estas indonezia kaleŝo tirata per malgranda ĉevalo. Ĝi povas enhavi ĝis kvin pasaĝerojn. Tegmento farita el dreliko estas konstruita super la kaleŝo por ŝirmi homojn kontraŭ sunlumo.

Grupo de esperantistoj vizitis farmbienon kaj stalon en ekstera antaŭurbo de Jogĝakarta. La vizitantoj estis dividitaj en du grupojn. Ĉiu grupo havis veturigiston kiu uzis la ‘andong’ kun ĉevalo.

Veturigisto veturigis sian ‘andong’ laŭ kampaj vojoj kun surfaco el asfalto aŭ ŝtonetoj. Estis agrabla vetero kaj la kvietaj ĉirkaŭaĵoj estis kampoj, riveretoj, domoj ktp. Ni eniris ebenan herban kampon kaj komencantoj provis regi la ĉevalojn kiuj tiris la kaleŝojn.

Timiga momento okazis kiam

ĉevalo komencis kuri tre rapide kaj la besto preskaŭ forlasis la kampon! Por eviti katastrofon, la veturigisto lerte tenis la bridon kaj malrapide haltigis la ĉevalon. Kia eskapo, ĉu ne? Mi lernis komandi la ĉevalon en la kampo kaj, konsekvence, mi ĉevalo veturigis ‘andong’ tra la kampaj stratoj.

La plej malfacila parto en la uzo de ĉi tiu veturilo estas lerni veturigi kaj ĉevalon kaj kaleŝon ĉirkaŭ stratangulo. Dum unu el miaj unuaj provoj, mi ŝanĝis direkton tro frue kaj la kaleŝo riskis renversiĝi. Unu el la pasaĝeroj panikis sed, post evito de akcidento, ŝi trankviliĝis.

Poste ni veturis tra longa rekta mallarĝa urbeto strato eble je maksimume 20 kilometroj hore. Multaj aŭtomobiloj estis malantaŭ ni kaj ni aŭdis sonorilojn de malpaciencaj veturistoj. Finfine ni revenis al la stablo. La rajdo sur ‘andong’ kaj ĉevalo daŭris proksimume 90 minutojn kaj estas memorinda travivaĵo.



Komenco de veturo: kiu estas preta por aventuro?



Jen tio kion vidas la veturigisto. Oni povas vidi la malantaŭan parton de la antaŭa ‘andong’ kaj tipan apudvojan ĉirkaŭaĵon.

ALIĜU NUN!

Vizitu aea.esperanto.org.au/kongreso



2017 AŬSTRALIA
ESPERANTO-KONGRESO

**SPECIALA
GASTO: JOMO!**

BRISBANO
6a-15a Januaro 2017



AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Nekonata vizita destino: Palmerston North

SENNOMA MONDVOJAĜANTO (IE)

Ne multaj eksterlandanoj scias pri Palmerston North, urbo en la suda parto de la Norda Insulo de Nov-Zelando, je 140 kilometroj norde de la ĉefurbo, Velingtono.

La loĝantaro de Palmerston North estas proksimume 80 000, kio signifas ke ĝi estas inter la 10 plej grandaj urboj de Nov-Zelando. Palmerston North situas ĉe la centro de agrikultura regiono, kaj la loka universitato (Massey University) kaj apudaj sciencsploraj kompanioj famas pro sia laboro pri la scienco kaj produktado de nutraĵoj. Pro tio, Palmerston North estas tre 'lerta' urbo pro siaj centoj da sciencistoj kaj studentoj. Venas sufiĉe multaj

studentoj el aliaj landoj por studi pri agrikulturo kaj rilataj fakoj.

Palmerston North havas ne nur universitaton, muzeon, kaj artgalerion, sed ankaŭ hospitalon, flughavenon, kaj multajn restoraciojn, sportejojn, kaj kafejojn. Ĝi estas fama pro la Nov-Zelanda Muzeo pri Rugbeo kiu troviĝas tie. Domprezoj estas malaltaj kaj, pro tio, Palmerston North estas taŭga loko por familioj kaj emeritoj. La ĉeesto de eksterlandaj kaj lokaj studentoj donas al la urbo junan, internacian etoson.

Por atingi Palmerston North, iru per trajno, aŭtomobilo, aŭ aŭtobuso el Velingtono (proksimume 90 minutoj) aŭ flugu el unu el la ĉefaj urboj.

Feilding, pli malgranda urbeto proksima al Palmerston North, kiu ofte gajnas premiojn kiel la 'plej bela urbeto en Nov-Zelando'



Diplomatio estas senpova: problemoj ĉe la Ligo de Nacioj samas ĉe UN nun

PAUL DESAILLY (SUD-AŬSTRALIO)

Imagu la sentojn post kvar jaroj da amasmortigo kiam en 1919 Prezidento Wilson alvenas Di-simile en Parizon portanta olivan folion por milit-lacaj eŭropanoj kaj por mond-civitanoj; eĉ la centraj potencoj laŭgrade konfidas al la usona estro. Kontraste al la bahaa takso, John Maynard Keynes malafable al Wilson parolas pri lia malŝparado de la plej bona ŝanco de la homaro. Du demandoj frapis min dum esplorado. Antaŭ la milita mortego 'Abdu'l-Bahá en plej fortaj terminoj instigas siajn samreligianojn en Okcidento kaj en Persio ellerni la internacian lingvon. Li deklaras ke "la batalantaj rasoj, militantaj nacioj, malamikaj religioj, alproksimiĝos unu al la alia en la spirito de amo, kaj kunligiĝos unu kun alia" ĉar ĝi, Esperanto, "akcelos la alvenon de tiu tago, tiu miljara tago, kiun antaŭdiris profetoj kaj viduloj, tiu tago en kiu, estas dirite, la lupoj kaj la ŝafido trinkos el la sama fonto, la leono kaj la cervo sin paŝtos sur la sama herbejo."

"Ne ĝis tiam kiam la afero de universala paco fariĝas persona religia konvinko", diras 'Abdu'l-Bahá en junio 1919, "pruvos ĝi esti permanenta. **Diplomatio estas senpova**; la ĉiopova Di-Vorto devas establi kaj fari ĝin viva, potenca kaj daŭranta faktoro en la mondo. Koroj estu purigitaj kaj neniu spuro de

venĝo, malamo aŭ amareco restu en la koro ĝis paco fariĝos permanenta."

La penado de diplomatoj por (a) glatigi la vojon cele al internacia sporto kaj komerco ktp kaj por (b) konstrui infrastrukturon por okazigi vid-al-vidajn interkonsiliĝojn sur la monda scenejo, kiel establiĝis de membroŝtatoj en 1919 kaj 1945, ne estas malestimata de 'Abdu'l-Bahá en lia ikonrompa teksto. Li ĉefe aludas, mi sentas, al magraj rezultoj de diplomatio ĉe Versajlo en junio 1919 inter la potencoj de la unua mondmilito kaj, konsekvence, al similaj fiaskoj dum la faŝista erao, la Malvarma Milito, ktp. Li lamentas ĉefe pri nia evitemo rilate la solan solvon: rekonu la fonton de saĝeco kaj agnosku la potencon de la plej freŝa mesaĝo de Dio movi ĉiujn korojn. Ilustrante senfortan diplomation ĉe sia plej malbona flanko, la venĝ- kaj pun-strukturo kaj terminaro de simile malsukcesaj traktatoj de la epoko ĝermigis semojn de konflikto kies trud-kreskaĵoj pretervivis la duan mondmiliton kaj ankoraŭ venenas la vivon de Mez-Oriento. Unu rimedo sola ekzistas, por internaciaj organizaĵoj tiel ankaŭ por ĉiu animo sur la Tero, nome: prioritatigu la unuecon de la homaro kaj la spiritajn principojn por realigi ĝin, precipe: "la plej grava servo al la homaro estas establi ĉi tiun

internacian helpkomunikilon” t.e. Esperanto, kiel deklaras ‘Abdu’l-Bahá.



Historia foto en Kairo montras la fascinantan multlingvulon kaj multesciulon, Gertrude Bell, (1868-1926) (*Queen of the Desert*, Reĝino de la Dezerto, filmo kun Nicole Kidman, 2015), kune kun ŝia estro, Winston Churchill, ĉapelon ĉe-mane; li difinas diplomation kaj takton jene: “Diplomatio estas la arto rakonti al homoj iri al infero tiel ke ili petas direktojn.” “Takto estas la kapablo diri ke ili iru al infero tiel ke ili atendas kun ĝojo al la vojaĝo.”

Reen al Versajlo! Evidentiĝas dum la Pariza pac-konferencokelaestroj de la aliancitaj potencoj dividas nenium komunan lingvon. Ke tiuj gvidantoj esprimas sin en tri apartaj eŭropaj lingvoj, ekskludante la lingvon de Goethe, lingvo ‘kaputt’, se tiel diri, nur akcentas siajn diferencojn; pri ilia japana aliancano ili komprenas absolute nenion. Je tiu sama epopea momento Esperanto atingas pinton de populareco inter la funebrantaj kaj ĉagrenitaj homamasoj, kaj ankaŭ inter multnombraj intelektuloj,

tiagrade ke dum trijara periodo inter 1921 kaj 1923 patriarkoj de la Ligo – tute, ho ve, sen matriarkoj ĉe tiu stadio de homa evoluo - reage al tiu pozitiva publika opinio favore al la Internacia Lingvo, en tiu embria kaj historia monda forumo debatas pri Esperanto kvar fojojn.

La eta foto inter du famaj Esperanto-aktivuloj de la Ligo de Nacioj montras la Grafon de Perto, Kavaliron Eric Drummond (1876-1951), la Ĝeneralan Sekretarion de la Ligo, 1920-1933: “al la celoj de la Esperanto-Movado favore disponita”; li forpasis la 15-an de decembro, dato festita koincide tra la mondo kiel Zamenhofa Tago.



Maldekstre-dekstre: Lordo Robert Cecil, Kavaliro Eric Drummond, Inazō Nitobe

Kvankam ŝoke legi, jen pruvo de la senpoveco de diplomatio ĝis kiam la kriterio estas la Vorto de Dio revelaciita de la Promesito de ĉiuj popoloj de la mondo, Bahá’u’lláh. Kune tiuj tri honestaj nobeluloj malgraŭ morala subteno de milionoj da pacistoj tra la mondo, malgraŭ siaj respektataj kaj eminentaj pozicioj en orienta kaj okcidenta politik-, intelekt- kaj religi-rondoj, malgraŭ sia dividita Esperantismo, malgraŭ siaj riĉaĵoj, bonvolo kaj klopodoj, kaj malgraŭ sekretariado de la tuta Ligo mem (Drummond), prezidanteco de

la Unio de la Ligo de Nacioj por la Brita Imperio (Lordo Robert Cecil), kaj sub-sekretariado de la sama Ligo de Nacioj (Nitobe), sinistra forto subfose malsukcesigas ilin. Ĉu pli grandaj ofendoj ekzistas ol monamo, ol volupto al ĉefeco kaj potenco, ol kultura ekskluziveco, ol kondamni generacion ankoraŭ nenaskitan al ripeto de mondmilito! “Pli bone estus por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj li estus ĵetita en la maron, ol se li metus falilon por unu el ĉi tiuj malgranduloj.” (Luko 17: 2)

(1920) En la komenco de la dudekaj jaroj de la lasta jarcento kaj de la aĝo de konsumismo la Skizo-Rezolucio pri Esperanto de la Unua Asembleo de la Ligo de Nacioj impone kaj inspire inkludas Bahá’u’lláh-ecan klaŭzon kiu, ho ve, estas forigita kiam la Dua Asembleo kunvenas en 1921 por trakti denove la Esperanto-demandon: “La Ligo de Nacioj esperas vidi instruadon de Esperanto fariĝi pli ĝenerala en la tuta mondo, por ke **la infanoj de ĉiuj landoj sciuj almenaŭ du lingvojn - gepatran lingvon kaj facilan rimedon de internacia komunikado**, kaj petas al la Ĝenerala Sekretario prepari, por la venonta Asembleo, raporton pri la rezultoj atingitaj en tio.” Jam en 1920 kaj denove en 1921 la Kristana esperantisto kaj Nobel-pacpremiito por 1937, Lordo Robert Cecil, kun la talenta subteno de doktoro Edmond Privat, svisa esperantisto en la persa delegitaro, kaj aliaj bonuloj proponas en diversaj rondoj ke la Ligo de Nacioj adoptu Esperanton kiel solvon de la lingvo-problemo. (Vidu

paĝojn 62-63 de *La Danĝera Lingvo* de D-ro Ulrich Lins pri pozitivaj provoj de la persa registaro en decembro 1920 kaj septembro 1921.)

(1921) La Dua Asembleo de la Ligo de Nacioj re-levas la Esperanto-debaton altirante al si ankoraŭ pli alt-rangajn ludantojn al la monda scenejo; ili akriĝas la nivelon de diskutado. La plej justa gravulo de la Ligo, laŭ mi, Inazô Nitobe, ekagis; li meritas niaflanke grandan studadon.

(1922) En la Tria Asembleo, la Ligo de Nacioj decidas (kiel ĉe Unesko en 1966 malgraŭ rekorda peticio de unu miliono da homoj) “daŭre rigardi” la kreskon de Esperanto kaj observi la kurantan evoluon en kaj pri la uzado de la Zamenhofa lingvo. Institucia gvidado por la homaro post la plej granda buĉado en la mond-historio! En septembro 1922, konforme kun reguloj de la Asembleo, la Ligo delegas la demandon (t.e. en realo: dilui kaj eviti) al la Internacia Komitato pri Intelektua Kunlaborado (IKIK) al kiu oni taskis pritrakti lingvo-uzadon ĉefe en pli larĝa kunteksto de kulturo kaj je multe malplia grado rilate la komencan celon ligitan al la monda paco - universala helplingvo por ĉiuj lernejoj infanoj. Por validigi sin ĉi tiu koruptita komitato estas prezidita de renoma filozofo, Henri Bergson, kiu en 1927 estos Nobel-premiito en literaturo, kaj inkludas mondfamajn homojn kunvenintajn en ‘la urbo de la nacioj’.

(1923) En aŭgusto 1923 post kiam la IKIK-prezidanto finfine montras sian veran sintenon kaj kalumnias Esperanton, ĝia komitato

efektive kastras ĉiujn altnivelajn interkonsiliĝojn pri monda helpilo ĝis post la Holokaŭsto! Kelkajn monatojn antaŭ la Bergson-atako, Berard, la franca Ministro por Edukado, dum du kernaj jaroj de 1922 ĝis 1924, malpermesas Esperanton en ĉiuj publikaj lernejoj de Francio. (Antaŭ ol plendi kontraŭ Francio konsideru fruajn jardekojn de la Esperanto-movado kiam Francio naskis la unuan Universalan Kongreson kaj multajn bonegajn figurojn de la movado-kajmanpleno de la plej malbonaj en la mallongdaŭra sed damaĝa Ido-skismo; en lastaj generacioj franceparolantaj esperantistoj brile kaj malavare subtenadas Esperanton.) Tiu terura rakonto pri forlaso de onia konscienco konsistigas de la plumo de 'Abdu'l-Bahá veran bildon rilate la senpovecon (ne senutilecon) de diplomatio por atingi efektivigon de tutmonda paco. Memevidentas kial alt-ranga komitato de eminentuloj, aŭ lerte manipulita aŭ subaĉetite dungita, estas persvadata kontraŭ granda elspezo subfosi la laboron de Cecil kaj Nitobe, konfuzi la publikon kaj konservi je ajna kosto la regantan mondordon kaj ties lingvojn de tiu erao – la anglan kiel la duan, sed destinitan post la dua mondmilito superi, kaj la francan en la rolo de la numero unu, t.e. la lingvo de la aristokrataro kaj de la diplomatia servo.

Ne ĉiu maro enhavas perlojn! Malgraŭ granda privata aŭdienco kun 'Abdu'l-Bahá, intervenas la negativa sinteno de Henri Bergson kiel estro de la IKIK, la antaŭulo de ESK | paĝo 20 | 125 | decembro 2016

Unesko, kies patro en Nov-Jorko (UN) nun tenas historiajn fotojn kaj arkivojn de tiu malgaja tempo de oportuno perdita. Je la sama komitato (ne en la Ligo mem) ni vidas inter aliaj famuloj Marie Curie (la sola virino) kaj Albert Einstein. Se pripensi lian honoran prezidantecon de granda Esperanto-kongreso en Kassell en 1923 kaj la polajn radikojn de Curie kune kun ŝia laŭdira admiro al la Zamenhofa celaro mi atendas ke novaj eblecoj ĉe la Guglo-arkivo elektronike rivelos la plenajn sentojn inter Bergson kaj lia por-Esperanto nominala estro, Nitobe. Grave, al mi ŝajnas, se komitateca organizaĵo estas en tute ankoraŭ necesa, ke Esperantujo de hodiaŭ profitos jene: (a) Promociu vere travideblan kaj altnivelan Komisionon "kun membroj el diversaj regionoj kaj koncernaj kampoj, inkluzive lingvosciencan, ekonomikon, sociajn sciencojn, edukadon kaj la amaskomunikilojn", kiel proponas la Bahaa Internacia Komunumo. (Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá sen referenci komitaton simile konsilas.) (b) Akceptu konsenton pri la selektado-demando decidita de evidente senpartiaj arbitraciistoj (plurale), ne nur de unu truda arbitracianto kiel okazis antaŭ naŭdek jaroj ĉe Ligo de Nacioj dum debatoj pri Esperanto unuavice kiel helplingvo por ĉiuj infanoj kaj due kiel ties propra laborlingvo.

Se prikonsideri ke la estro de Bergson ĉe la Ligo, almenaŭ nominale, estas nekoruptebla kvakero, elstara japana diplomato kaj Buŝido-propagandisto, Ĝenevo

en aŭgusto 1923 aspektas dekomence kiel (a) embusko desegnita malsukcesigi Nitobe Inazô, kaj (b) subteno al la lingvo de Voltaire post granda sukceso de la angla rezulte de la Lloyd-George-kaj-Wilson-angla-usona alianco ĉe Versajlo en 1919 kontraŭ la supozita nevenkebleco de la franca lingvo. Tiu malhonora historio inter la elito el diversaj nacioj, kaj potencaj oligarkoj en la ombroj, estas okazo por la franca registaro dum kerna du-jara periodo farsece malpermesi la instruadon de 'revolucia' Esperanto en ĉiuj publikaj lernejoj kaj eble eksplikas ankaŭ la Einstein-an opiniŝanĝon origine favoran al Esperanto kiel demonstras Kassel en tiu sama jaro. Baldaŭ post la Bergson-a kalumnio kontraŭ Esperanto ses altrangaj komitatanoj voĉdonas kontraŭ kun 3 sindetenoj. Kvankam Einstein estas eble la sola jes-voĉo por Esperanto kadre de la IKIK-voĉdonado, li skribas en 1950 ke li neniam estis subtenanto de la Zamenhofa lingvo. La historia foto ŝajnas portreti Inazô-n ne au fait, ne au courant ne en accord kun la famaj franclingvaj kolegoj ĉe la konferencotablo, kun la ebla escepto de Curie kiu ne aperas en la foto, nek, mi supozas, en la embusko.

Malkonsentoj inter Bergson kaj Einstein daŭris ĝis 1939. Okupacio de la Ruhr, malalta konfido pri la Ligo mem kaj pri iuj "trompaj promesoj" de tre franc-reprezentitaj komitatoj decidigis al Einstein forigi la IKIK-on dum unu aŭ du jaroj. Plorinde ilustritaj estas (i) nia daŭranta fininklino adori elokventulojn kaj spertulojn eĉ kiam ili ekster la propra

fako oratoras ekzemple pri nekonataj dimensioj de la Di-kreado rilate tempon, kaj (ii) ĝenerala seniluziigo pri religio dum la unua mondmilito kaj la Granda Depresio, precize tiam kiam fiziko kaj kosmologio asertas superregon eĉ de filozofio. Profesoro Jimena Canales kaj la arkivo de Radio National (Aŭstralio) priskribante malpacon inter Einstein kaj Bergson tuŝas aferojn ankoraŭ validajn en nia tempo, rilate al (a) scienco (iam nomita, natura filozofio) kaj religio, (b) fiziko kaj filozofio kaj la rolo de scienco en socio hodiaŭ.

Por akceli per osmozo multe de mi sopiritan kunfandiĝon de niaj du movadoj kies idealoj ofte similas, cirkvito-dispeciga miraklo estas necesa: nova generacio de sendependaj bahaanoj, de neniunacia lingvo aŭ karismaj gvidantoj kaptitaj, en konscienco, post sincere esplori la principon de universala helplingvo, havas kiel individuaj kredantoj neniun alternativon ol serioze engaĝi la Internacian Lingvon. Reciproka beno konsistas en tio, ke dum ni bahaanoj sincere enketas pri la principo mem, sen troa atentigo pri la institucia demando pri selektado, kaj respondas al "la ripetitaj kaj emfazaj admonoj" de 'Abdu'l-Bahá ke ni studu kaj disvastigu Esperanton laŭeble, tridek-jara malsukceso varbi novajn adeptojn finfine ĉesos, neniam ripetota – Dio donu.

Shoghi Effendi diras ke la homoj de la mondo estas ĉiam rigardantaj la sekvantojn de Bahá'u'lláh; Li parolas pri la amo, paco kaj unueco kiujn ni bahaanoj devas radii kiel

antaŭkondiĉo por disvastigi nian Kredon dum li notas tamen ke la fundamentaj bahaaj principoj kaj moralaj instruoj devas foje esti laŭte emfazitaj por ke la publiko vidu ion pli bonan ol de ili jam poseditan:

“Se, ekzemple, la ne-bahaanoj demandas la amikojn: ‘Kio distingas vin de ĉiuj aliaj homoj?’ kaj se, al tio, la amikoj respondas: ‘Laŭlonge de la vojo de nia amo por Bahá’u’lláh ni ofertas niajn vivojn kaj posedaĵojn’, tiuj de la civilizita mondo neniam kontentiĝos pro tia respondo. Ili nur diru: ‘Via amo, via ofero al sola individuo neniel povas servi kiel rimedo por la kronikaj malsanoj kiuj plagas socion hodiaŭ.’ Se la amikoj tiam respondas: ‘Nia religio provizas principojn kaj moralajn instruojn kies valoro la plej saĝaj hodiaŭ ne povas nei,’ tio ĉi estos la respondo: ‘Noblaj principoj kaj instruoj produktos efikon sur homa karaktero kaj resanigos la mortajn malsanojn afliktantajn socion, nur je tiu tempo kiam tiuj kiuj asertas kredi kaj subteni ilin estas mem la unuaj vivigi ilin, kaj en siaj propraj ĉiutagaj transakcioj korpigi la benojn kaj valoron de ili.’ Se tio ne okazas, estas nenio por distingi la bahaanojn de ĉiuj aliaj homoj.” (vortoj de Shoghi Effendi je la komenco de longa servado al Dio)

“Dankon al Dio ke D-ro Zamenhof elpensis la lingvon Esperanto; ĝi posedas ĉiujn eblajn kvalitojn por fariĝi rimedo de internacia interkomunikiĝo. Ĉiujel ni devas esti kontentaj kaj dankemaj al li por lia nobla penado, ĉar tiumaniere li faris bonan servon al siaj proksimuloj.

ESK | paĝo 22 | 125 | decembro 2016

Per senlaca penado kaj sinoferemo flanke de ĝiaj pioniroj Esperanto fariĝos universala. Tial ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo...” (‘Abdu’l-Bahá, *Bahá’u’lláh kaj la Nova Epoko*, paĝo 165 (De Lidia Zamenhof Esperantigita))



“Abdu’l-Bahá diras ke Esperanto disvastiĝos kaj eĉ rekomendis ke ĉiuj bahaanoj kiuj povas, tiuj studu ĝin.”
Shoghi Effendi



D-ro. L. L. Zamenhof: “La personon de ‘Abdu’l-Bahá kaj lian laboradon mi tre alte estimas: mi vidas en li unu el la plej grandaj bonfarantoj de la homaro.” (laŭ *La Vivo de Zamenhof* de E. Privat)

Indrani en Okcidenta Aŭstralio

INDRANI BEHARRY-LALL (ADELAJDO)

Je la komenco de oktobro mi havis mallongan ferion en Okcidenta Aŭstralio. Mi unue ĉeestis danc-kunvenon en Cannington, kaj poste pasigis 6 tagojn kun unu el miaj plej ŝatataj esperantistoj... Vera Payne el Perto.

Antaŭe mi mendis 3 unu-tagajn ekskursojn: Pinnacles, Valley of the Giants kaj Wave Rock. Malgraŭ la freneza vetero, mi estis sufiĉe bonŝanca ke mi povis almenaŭ ĝui la diversajn aktivajn partojn de tiuj ekskursoj en 'senpluvo'.



la arbo daŭrigis sian kreskadon. Mi ankaŭ ĝuis la famajn 'Sovaĝ-florojn' de Okcidenta Aŭstralio.

Bedaŭrinde Vera rifuzis fari memfoton kun mi en la bela Kings Park kun la Signa Rivero kaj Perto en la fono!

Vera kaj mi ofte krokodilis, ĉar kiam mankas tempo ni povis pli multon preparoli en la angla!

Estis agrabla ferio sed certe ne sufiĉe longa!



Mi glitis sur planko suben en nekredeblaj sablo-dunoj, ŝajnis surfi sur Wave Rock kaj miris pri la kelkcent-aĝaj Tingle-arboj kiuj ne ekzistas en orienta Aŭstralio. La interno de la arbo iam brulis sed ĉar la ligno estas tiel forta (la tiel nomata 'hardwood') la fajro mem estingis kaj



Konversacio kun Alekso, afabla hundo

BOB FELBY (ADELAJDO)



Bob: Saluton Alekso! Kiel plaĉas al vi loĝi kun mi ĉi tie?

Alekso: Tre bone, mi ne povus trovi pli bonan amikon! Mi loĝis ĉe geedza paro kaj la du geedzoj laboris la tutan tagon. Mi estis sola hejme kaj mi ne rajtis esti endome ĉar mi estas ja hundo. Tial, mi pasigis la tutan tagon sola en la ĝardeno bojante al ĉiu heliko kaj preterpasanto por ne menciigi la birdojn!

Bob: Ĉu vi do neniam estis interne de la domo?

Alekso: Jes, tio okazis. Kiam la geedza paro hejmenvenis, mi rajtis eniri la domon por manĝi iomete. Sed kiam ili enlitiĝis, mi estis sendita en la ĝardenon por pasigi la tutan nokton tie.

Bob: Ĉu ne plaĉis al vi pasigi noktojn en la ĝardeno?

Alekso: Komprenoble, sed ne tiom dum longaj, vintraj noktoj!

Bob: Bona respondo! Mi mem, post multaj jaroj kiel noktogardisto, preferas pasigi miajn noktojn en la lito!

Alekso: Jes, kaj nun, kiam ni ambaŭ estas maljunuloj, ni ja rajtas fari tion kion ni volas, ĉu ne? Kaj ĉu vi scias ke, post kiam vi profunde dormegas en via lito, mi ensaltas vian liton kaj dormas, se tio eblas, eĉ multe pli bone ol vi?

Bob: Ĉu vere? Tion mi ĝis nun ne sciis. Sed bone, eĉ bonege, mi neniam koleras kontraŭ vi. Vi estas ne nur la plej bona amiko de la homaro, vi estas, antaŭ ĉio, mia plej bona amiko kiu varmigas mian liton, ne nur dum la vintro, sed dum la tuta jaro!

Melburna biciklado

JOANNE JOHNS (MELBURNO)



Dum longa tempo, grupo de melburnaj esperantistoj diskutis pri dutaga bicikla ekskurso laŭ la malnova fervojo inter Lilydale kaj Warburton.

Finfine ni elektis daton en oktobro, nesciante, ke ni sukcese trafus la plej malvarman, plej pluvan semajnfinojn inter aro de belaj sunplenaj semajnoj.

Kvin homoj prenis parton en la aventuro, plene malsekiĝis kaj estis

kovritaj per koto - sed ĉiuj ĝuis la okazon. Ni haltis duonvoje ĉe bakejo en Woori Yallock kaj daŭris tra la belega kamparo ĝis Warburton.

Tie ni kune vespermanĝis, kaj tranoktis ĉe hotelo, antaŭ ol ni revenis laŭ la sama vojo (en pli bona vetero) la sekvan tagon.

Pro la vetero ni ne renkontis multajn aliajn homojn survoje, kio pli faciligis la vojaĝon.

Freŝaj kaj plenaj de energio je la komenco




Duonvoja paŭzo por tagmanĝo ĉe bakejo







Ĉi tiu kaj antaŭa paĝoj: Fotoj de la bela pejzaĝo survoje, la koto, la bela vido de mia hotelĉambro kaj nia vespermanĝa kunveno. Dekstre estas ekrankopio kiu montras kiom da kilometroj ni biciklis dum la du tagoj.



Kompatinda Malkolmo

BOB FELBY (ADELAJDO)

Kun granda malĝojo mi devas raporti ke mia najbaro forpasis. Li estis ne nur bonega najbaro, sed – kaj tio multe pli gravas – li estis antaŭ ĉio ankaŭ treege bonega homo!

Oni forportis lian eluzitan korpon kaj la domo en kiu li loĝis dum tiom da jaroj restis malplena dum – mi preskaŭ estus dirinta “miloj da jaroj”, sed tio ne veras. Sed la domo restis malplena plej verŝajne multajn jarojn dum la aŭtoritatoj regantaj nian vivon decidis kiu rajtas aŭ ne rajtas loĝi en tiu domo.

Por plilongigi la atendotempon

de tiom multege da senhejmuloj en Aŭstralio, dum kelkaj jaroj oni faris nenion. Poste komencis veni al la domo kelkaj metiistoj por ripari, farbi ktp. Mi komencis miri ĉu iam venos iu por loĝi tie, sed eĉ mi surpriziĝis.

Subite iun belan tagon blanka aŭtomobilo haltis antaŭ la domo. Du homoj, ŝajne geedza paro, elaŭtomobiliĝis kaj iom poste ankaŭ du infanoj, knabino kaj knabo, eliris. Unue ili rigardis la straton kaj ĝiajn domojn. Tiam ili eniris la ĝardenon. La virino serĉis en sia mansako kaj trovis

ŝlosilon. Ili ĉiuj eniris. Mi pensis: “ho bone, fine venos iuj por loĝi en tiu domo. Mi esperas ke la infanoj kaj la patro ne estos tro bruemaj”.

Kelkajn minutojn poste ili ĉiuj reenĝardeniĝis kaj survojiĝis. Preskaŭ tuj ili enaŭtomobiliĝis kaj veturis for. Mi refoje pensis: “Kiom longe ni devos atendi ĝis tiu familio enloĝiĝos?”.

Pasis kelkaj semajnoj, poste ankoraŭ kelkaj semajnoj kaj fine kelkaj monatoj dum kiuj de tempo al tempo venis kelkaj homoj por vidi la loĝejon. Sed fine, iun matenon, grandeta ŝarĝaŭtomobilo haltis ekstere farante iom da bruo. Mi rigardis el la fenestro, mi ja ne povas rigardi el la muro, kaj vidis du virojn elportantajn pezajn meblojn el la ŝarĝaŭtomobilo en la domon. Tio daŭris kelkajn horojn. Mi ne povis helpi ilin ĉar mi povas porti eĉ ne unu tre malgrandan seĝon.

Kelkajn tagojn poste mi refoje vidis unu el tiuj du viroj. Mi salutis lin kaj premis lian manon kaj bonvenigis lin al nia kvieta kaj senbrua strato. Ŝajnis ke li estas tre bonega kaj tolerema homo sen edzino kaj infanoj. Niaj saĝaj aŭtoritatanoj saĝe disdonas loĝejojn ne al familioj kun infanoj, tute ne. Domojn kun multaj ĉambroj oni donas al viroj kiuj estas tute solaj en la mondo. Familioj povas - laŭ la opinio de aŭtoritatuloj - dormi sur la strandoj aŭ en parkoj!

Do, mi kaj tiu viro, kion ni nomu lin, ĉu Tonio aŭ ĉu Malkolmo?, iom post iom iĝis tre bonaj amikoj. Malkolmo neniam iris al iu ajn laborejo sed, malgraŭ tio, ĉiam ŝajnis ke li havas sufiĉe da mono por fari nenion. Mi ne ŝatas ke homoj fumas, tion rajtas

fari fumtuboj, sed homoj ja ne estas fumtuboj. Sed tiu Malkolmo fumis eĉ multe pli ol fumtubo. Mi petis lin ne fumi apud mia domo, sed tiu ĉi mia bona amiko tute ne povis kompreni tion. Laŭ lia opinio mi devas cedi al ĉiuj liaj frenezaj ideoj.

Iom post iom li iĝis pli kaj pli freneza. Iun tagon li konfesis al mi ke li fine volas serĉi laboron. Mi demandis al li kian laboron li volos fari. Li konfesis ke li fakte tute ne deziras ion ajn fari. Li estis de la opinio ke ni ĉiuj, ni membroj de la laborista klaso, devas fari la laboron, kaj krome pagi lian salajron, domluadon, tabakon, alkoholon, feriojn ktp. Mi ne respondis al tiuj liaj frenezajoj. Mi tuj komprenis ke jen mia najbaro estas mallaborema frenezulo kiu kredas ke ni ĉiuj ŝuldas al li nian monon kaj komforton. Li kredis ke nur li devas ne labori dum ni ĉiuj devas fari ĉion dum li sidas hejme rigardante la televidilon kaj ĝiajn frenezajn programojn.

Iun tagon li konfesis al mi ke li jam iĝis politikisto kaj nun estas senatano en iu distrikto. Ĉar mi vere kaj sincere dubas, ja eĉ dubegas, ĉu li scias kiel uzadi sian cerbon, se li ion tian havas, mi decidis demandi kion li faros se la milito finfine venos pli proksimen al ni. Jen lia freneza respondo: “Tiam mi igos vin kaj ĉiujn aliajn en la strato soldatoj. Vi povos defendi min, ja eĉ morti por mi, ĉar mi estas bona, eĉ bonega gvidanto de la popolo”.

Kion mi povis respondi al tia malsaĝa eldiro? Nur tion: “Vi estas stultulo. Mi ne komprenas kial iu ajn en tiu ĉi antaŭ nelonge saĝa lando povis voĉdoni por vi. Mi fakte dubas ĉu la voĉdonado estis demokrata!”.

Konjekto

THOMAS O'GRADY (KVINSLANDO)

1. EKZISTAS NUR LA UNUO. Ĉio estas la **UNUO**, la **UNUO** estas ĉio - ĉiu partiklo kaj atomo, ĉiu galaksio, ĉiu universo, ĉiom da spaco kaj tempo kaj gravito kaj radiado kaj forto kaj influo ĉia, ĉiu vivaĵo aŭ ŝajna malvivaĵo, ĉiu penso, imago kaj fikciaĵo - kaj ĉiom da spirito, de la spirito de atomo ĝis la spirito de mil galaksioj. **Ĉio!**

2. SED AL NI HOMOJ ŝajnas ke estas senfina miriado da apartaj aĵoj, ĉu kunaj, ĉu neimageble apartaj en tempo kaj spaco aŭ probableco. Tamen, ili estas ĉiuj la **UNUO** - eĉ se kunligitaj nur per konscioj kiuj konceptas ilin.

3. ĈIUJEROJ DE LA UNUO, kajaroj da eroj, havas **EMON** kiu, kontraste al la entropio (la emo de sistemoj al malordo), celas al komplekso, al ambaŭ simileco kaj senfina vario, al la vivo - kaj evoluo al la konscio kaj racio. Simile, el tiu racio la **EMO** estigas **simpation** kun aliaj vivaĵoj kaj ŝajnaj malvivaĵoj. Nomata la **AMEMO**, ĝi estas **aspekto de la UNUO**.

(Nia sola konata ekzemplo de vivo estas sur la tero; la filmoj de Kavaliro David Attenborough devus konvinki pri tio supra.)

4. TIU SIMPATIO emas al, kaj fariĝas, universala amo, nomata la **UNUAMO**. Tiu **UNUAMO** ankaŭ estas **aspekto** de la **UNUO** - kaj evidente celo de la **UNUO**, kaj certe **centra realo** de la **UNUO**.

5. ĈIUJ FILOZOFIOJ, SCIENCOJ, RELIGIOJ, PENSMANIEROJ, estante eroj de la **UNUO**, havas konstantan valoron, **nur tiom kiom ili kongruas** kun la **AMEMO** kaj la **UNUAMO**.

6. NI VIDAS LA NATURAN MONDON plenan je la plej mensofrape ingenia vario, miriga belo kaj profunda mistero. Tute atende, ĉar ĉie agas la **AMEMO**.

7. SED KIAM NI VIDAS la homan mondon, jen ne nur amo aganta sed milito, krueleco, malamo, egoismo, malakordo kaj avido, ĉie komplikita de fanatikeco, miskompreno, nescio kaj troa popolnombro. Kial tiu manko de **simpatio**, de reciproka amo?

8. LA UNUO estas realo en kiu neniu progresata ŝtato aŭ kvalito povas ekzisti sen la eventuala ekzisto de sia malo. Tiuj maloj estas kvazaŭ la ombro de la **AMEMO**. **Neeviteble**, ĉiu raciulo devas elekti sian direkton: antaŭen al la **UNUAMO** aŭ retroen en la ombron.

9. TIAL, LA IDEALO por ĉiu raciulo, povanta elekti, estas serĉi taŭgan strion de la **AMEMO** kaj vivi laŭ ĝi.

10. ĈAR LA UNUO enhavas ĉion kio ekzistas, ekzistis, aŭ ekzistos, nenio povas definitive malaperi; tial la homa timo pri neniiĝo ĉe morto ne validas. Kio do venos? Ni ne scias, sed, ĉar ni certas ke la **AMEMO** de la **UNUO** regas, ni povas atendi progreson al la **UNUAMO**. Kia estos tiu ŝtato? Eble estas infinito da tre variaj ŝtatoj kaj vojoj tien!

11. TAMEN, MULTAJ ULOJ vivas vivlonge en mizero, doloro, malamo, manko kaj subpremo. Ĉu la **AMEMO** iel valoras al tiuj? Ni memoru ke, **estante eroj de la UNUO, ilia ekzisto estas senfina**; individua vivo estas eta epizodo. Ĉe la **pli granda ulo** (la sumo da ĉiuj vivoj) morto estas tia kia por ni estas vekiĝo el sonĝo aŭ koŝmaro. Unu vivo estas nur unu eta **parto** de tiu pli granda ulo, sed tamen havas siajn necesojn, valoron kaj gravecon.

12. DO, ĈIUJ ULOJ, SENESCEPTE, kaj sen perdo de individueco, fine estos kun la **UNUAMO**.

Ganeŝo (Hindua fabelo)

THOMAS O'GRADY (KVINSLANDO)

En la hindua panteono estas tri superaj, grandiozaj dioj: Bramo, la kreanto, Viŝnuo, la konservanto, kaj Ŝivo, la detruanto.

Ŝivo loĝis en fortigita Himalaja palaco kun edzino Parvata kaj filoj, Ganeŝo kaj Skando, kaj siaj servistoj, la Ganoj. Iam okazis ke Ŝivo devis forvojaĝi por viziti Viŝnuon kaj pacigi ties grumblojn ke li tro detruadas.

Do, li alvokis sian unuan filon, Ganeŝon, kiu aperis ankoraŭ tenanta dikan libron en sia mano. 'Filo, vi nun havas sufiĉe da jarcentoj por ripozi. Vi devos gardi nian hejmon dum mi estas for kaj prizorgi niajn belajn ĝardenojn. Kaj tenu tiujn petolemajn Ganojn en ordo!'

'Jes, Paĉjo,' respondis Ganeŝo, 'Paĉjo, ĉu vi scias ke estas naŭ planedoj en nia sun-sistemo?,' kaj li levis la libron por montri la fakton.

Laŭtis Ŝivo 'Kion vi babilas!? Ĉu vi aŭdis mian ordonon?'

'Jes, jes, Paĉjo, mi devos gardi ĉion.' 'Nu, atentu vian devon. Mi kontrolos kiam mi revenos!' kaj li enseliĝis sur sia bovego Nando kaj forgalopis.

Tempo pasis ĝis kiam la gardista Gano sur la gvat-turo kriis 'Venas la Mastro!'. Tial, Ganeŝo kuris tra la ĝardenoj ĝis la pordego, libro enmane. 'Bonvenon, Paĉjo!,' li diris dum Ŝivo elseliĝis.

'Saluton, filo. Ĉu ĉio estas en ordo?'

'Ho jes, Paĉjo. Paĉjo, ĉu vi scias ke ekzistas metalo kiu estas *likva* ĉe ordinaraĵaj temperaturoj?'. Li levis libron. 'Vi ankoraŭ babilas stultajojn, filo! Mi eniru kaj mem kontrolu!,' kaj li trapaŝegis la pordejon, kaj haltis

en konsternego. La ĝardenoj estis dezertaj, kaj en la ruinoj ĉie kuris kaj ludis la Ganoj kun gaja laŭta kriado. Tiam la dia kolerego eksplodis. Per unu svingo de potenca mano li batis for la kapon de Ganeŝo. Ĝuste tiumomente elvenis Parvata kaj vidis! Ŝi levis teruran kriĉadon. Iom da brikoj falis de la muroj. 'Kion vi faris, monstro? Mia preferata filo, ruinita! Vi devas ripari tion!' Multaj brikoj falis.

Kun manoj kovrantaj la orelojn, Ŝivo muĝis, 'Ĉesigu tiun kriĉadon, tuj!'

'Mi faros, se vi nur silentas.' Ĝuste tiam li ekvidis pasantan elefanton. 'Ha, sufiĉas,' li kriis, kaj plukinte ties kapon, metis ĝin sur la ŝultrojn de Ganeŝo. Ganeŝo ekstaris kaj manipulis sian rostron eksperimente. 'Paĉjo,' li diris, 'Ĉu vi scias ke tentaklo aŭ rostro estas pli utila membro ol brako?'

... kaj tial Ganeŝo ĉiam (ankoraŭ) aperas elefantkapa.

Ganeŝo iĝis patrono de klereco kaj forigisto de obstakloj.





New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Secretary/Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh, David
Dewar

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Joanne Johns, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.